


La 22an de julio 2017

50 jarojn post la unua nuklea eksperimento fare de Francio en Polinezio



La 22an de julio 2017 en la ĵurnalo Mainiĉi aperis artikolo pri nukleaj eksperimentoj fare de Francio en Polinezio. Mi resume tradukos ĝin.



Ĉu vi scias, ke Francio faris nukleajn eksperimentojn en Polinezio en la suda Pacifika Oceano antaŭ 50 jaroj?

En la atoloj Mururoa kaj Fangataufa okazis 193 nukleaj eksperimentoj ĝis 1996 kaj ankoraŭ nun problemoj de nuklea poluado ne solviĝis.

Societo 193

Ek de la jaro 1960 Francio eksperimentis atombombojn en la dezerto Sahara en Afriko, sed sendependiĝinta Alĝerio rifuzis tion, sekve Francio komencis eksperimenti en la atoloj Mururoa kaj Fangataufa en la suda Pacifika Oceano. En la 90-aj jaroj Francio ŝajne ĉesis eksperimenti, sed en 1995~96 ĝi rekomencis, pretekstante, ke mankas al ĝi sufiĉa datumo. Tiutempe okazis granda kontraŭbatalo, kiu evoluiĝis eĉ en puĉon.

La memorkunsido pri tiuj eksperimentoj okazis en la urbo Papeete en la insulo Tahiti en julio. Al ĝi estis invitita s-ro Akiba Tadatoŝi. Li oficis kiel la urbestro de Hiroŝima inter 1999 kaj 2011, kaj dume li estis la reprezentanto de “Urbestroj por paco”, al kiu nun membriĝas 7439 urboj el 162 landoj. Lia agado estis alte taksita, pro kio li ricevis Premion Ramon Magsaysay (memore al la filipina prezidento Magsaysay, kiu mortis en aviadila akcidento la 17an de marto 1957), alinome Nobelpremio de Azio.

S-ro Akiba flugis al la insulo Tahiti la 27an de junio. Lin renkontis s-ino Lena Normann, virino en siaj 40-aj jaroj, kiu apartenas al “Societo 193”. Antaŭe ŝi ne multe sciis pri la nukleaj eksperimentoj en Polinezio, sed tiun sintenon ŝanĝis la propono de tiutempa prezidento de Polinezio, ke li malkonstruu “Monumenton de la suferantoj pro la nukleaj eksperimentoj” por plimodernigi

la havenon. Tiu monumento estis starigita de la grupo “Mururoa kaj ni” en 2006. Ses metrojn kvadrato ĉirkaŭ ĝi estas metitaj ŝtonoj el la atoloj Mururoa kaj Bikini, el Hiroŝima kaj Nagasaki kaj lastatempe ankaŭ el Fukuŝima, kie okazis serioza nuklea akcidento en 2011.

Tiu propono ŝanĝis eĉ “ordinarajn homojn”. Lena sentis, ke la registaro intencas forviŝi parton de la historio kaj kaŝos la problemon de la nukleaj eksperimentoj kiel tabuon. Lena kaj aliaj junuloj kolektiĝis kaj fondis “Societon 193”, memore al la 193 eksperimentoj en Polinezio fare de Francio.

Ili organizis manifestaciojn, kaj tiu novaĵo movis la mondon, sekve komenciĝis internacie movado kolekti subskribojn kontraŭ tiu propono. Ankaŭ en Japanio oni kolektis pli ol 30 000 subskribojn. Dank’ al tiuj movadoj la prezidento retiriĝis, nenion farinte.

La societo pli kaj pli grandiĝis kaj nun ĝi havas mil membrojn. Por sukcesigi la 50-jaran kunsidon, ĝi ripete organizis manifestaciojn, kaj vizitis 43 distriktojn en polineziaj insuloj, informante la loĝantojn pri la problemo de la nukleaj eksperimentoj kaj kolektante iliajn voĉojn. Inter tiuj agadoj la plej grave estas realigi referendumon por postuli kompenson de Francio.

En la vilaĝa kunsido

La 28an okazis malgranda kunsido en iu vilaĝo. Kiam s-ro Akiba atingis ĝin, tie lin atendis 80 vilaĝanoj. Post komuna spektado de filmo pri la nukleaj eksperimentoj, li

parolis:

“Japanaj suferantoj pro la atombomboj agadas en tri kampoj: la unua estas publike paroli pri sia sperto, la dua estas postuli homajn rajtojn, kaj dank’al tio ili nun rajtas ricevi senpagan kuracadon, kaj la tria estas agadi por ke aliaj homoj ne spertu saman suferon kiel ili, kaj por tio ili agadas kontraŭ nukleaj armiloj kaj nukleaj eksperimentoj. Ni, japanoj, kunlaboros por ke viaj deziroj efektiviĝu.”

Longe la loĝantoj en Polinezio estis silentaj pri suferoj pro la nukleaj eksperimentoj, ĉar ĉirkaŭ 5000 homoj laboris por la eksperimentoj, kaj ili trudite promesis, ke ili ne parolu pri siaj laboroj. En la 90aj jaroj pli kaj pli malkovriĝis poluado pro radioaktiva “morta cindro”, sekve tiuj eksaj laboristoj komencis malfermi sian buŝon.

Ankaŭ en tiu kunsido loĝantoj parolis pri siaj spertoj:

“Ni estis avertitaj, ke ni ne manĝu fiŝojn kaptitajn en Mururoa”.

“Soldatoj havis dozmetron, sed ni ne”.

“Multaj homoj june mortis pro gaso el la vertikalaj truoj fositaj por la eksperimentoj”.

“Multaj el miaj parencoj suferas pro tiroida kancero”.

Juna patro alvokis al la ĉeestantoj: “Ni postulu, ke la registaro faru esploradon pri sanstato de la loĝantoj. Por movi ĝin, necesas forta movado. Ni petu de ĝi referendumon!”

Iu virino parolis: “Ni ne povas estis silentaj, ĉar tiuj eksperimentoj okazis en nia lando”.

Memorkunsido de la 2a de julio

La memorkunsido okazis la 2an de julio, kaj kolektiĝis 1000 homoj. Ĝis tiu tago “Societo 193” sukcesis kolekti subskribon el 45000 loĝantoj, nome el kvarono de la tuta loĝantaro.

La reprezentanto de “Mururoa kaj ni” s-ro Roland (foto)




diris: “Antaŭ ne longe malkovriĝis, ke en la insulo Hao kun 1000 loĝantoj situanta 500 kilometrojn norde de Mururoa estas poluita de plutonio. La loĝantoj postulas,

ke Francio purigu la teron, sed ĝi rifuzis. Se la tero sub Ejfel-turo estus poluita de plutonio, ĉu la registaro farus nenion?” “Ses jarojn antaŭe la franca registaro leĝigis kompensan sistemon, sed nur 2% el la petintoj estis akceptitaj. Ĝi reviziu la leĝon”.



50 jarojn post la unua eksperimento kaj 20 jarojn post la lasta, ankoraŭ large etendiĝas dezerta tero ne enirebla en la franca polinezia atolo Mururoa.

Poste s-ro Akiba staris sur la podio kaj parolis:



“En 1973, kontraŭ la franca nuklea eksperimento, tiutempa urbestro de Hiroŝima sidostrikis kaj atombombaj suferantoj malsatstrikis”. “Ankaŭ en Japanio oni bezonis 40 jarojn da malfacila agado por leĝigi leĝaron por helpi atombombitojn”. “Unu el la celoj de nia movado estas reakiri niajn homajn rajtojn. Tiu movado baziĝas sur digno de homoj, nome justeco, tial nia movado certe venkos”.

Oni bezonas multajn jarojn por venki. Lena, kiu surportas T-ĉemizon kun la cifero 193, staris antaŭ la monument kaj diris: “Nia devo estas informi la mondon pri la nukleaj eksperimentoj. Mi pli lernos pri Hiroŝima kaj Nagasaki”. Kie estas batalantoj, tie estas espero. Certe la situacio boniĝos. S-ro Akiba diris kun emocio: “Junaj homoj dividas siajn opiniojn kun lokaj homoj kaj ekstaras kun maljunaj homoj kaj ekleziuloj. Tio estas bona ekzemplo de la movado por homaj rajtoj”.

* Vi povos legi artikolon “The battle continues, 50 years after first test at Mururoa” sube:

<http://www.radionz.co.nz/international/pacific-news/307804/the-battle-continues,-50-years-after-first-test-at-mururoa>